

TEA-BULTENO

18^A JARO - N° 125

MAJO - JUNIO

N. 5-6/2015

Neniam uzu fremdajn dirmanierojn, scienca terminon aŭ malfacilan vorton, se tio, kun sama signifo, jam ekzistas en la ĉiutagaj lingvaĵoj.
George Orwell, angla verkisto, eseisto kaj ĵurnalisto (1903-1950)

Triesta E-Asocio lanĉas la 2^{an} Konkurson dulingvan pri Pentrado Premio "Liliana Cernecca Soranzo" - Jaro 2015

Regularo

Art. 1 Partopreno estas senpaga.

Je libera temo, la konkurso akceptas iun ajn teknikon, inkluzive de glulaboraĵoj, mozaiko kaj perkomputila grafiko.

Ĉiu verko devas enteni - sur la surfaco pentrita - tekston de almenaŭ unu vorto: en esperanto (skribita en verda koloro) kaj en unu el la lingvoj de Eŭropa Unio (skribita en alia ajna koloro).

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per nur unu ellaboraĵo kun maksimumaj dimensioj: 80x80 cm, inkluzive de la eventuala kadro. Perkomputilan grafikaĵon oni prezentu en printita formo, en dimensio maksimuma kiel menciite, kun aldonita dosiero por ebla uzo laŭ art. 4.

Art. 2 Sur la verka malantaŭo devas aperi la aŭtoraj datumoj kaj la titolo, en iu ajn lingvo. Krome, la pentraĵo estu provizita per taŭgaj iloj por simpla alkroĉado surmura.

Art. 3 La Art-Komisiono, alcele elektita, distribuos la jenajn premiojn:

1-a premio - € 450

2-a premio - € 250

3-a premio - € 150

Speciala premio por geknaboj ĝis 14 jaroj: € 100.

Ĉiu partoprenanto ricevos de Triesta E-Asocio partopren-diplomon.

Art. 4 Triesta Esperanto-Asocio retenos la premiitajn verkojn kaj havos pri ili plenan reproduktorajton.

Art. 5 Enskribiĝo kaj transdono de la pentraĵo okazos en 2015 ĉe la sidejo de TEA (via del Coroneo 15, IT-34133 Trieste - 3^a etaĝo) en la vendredaj tagoj, ekde la 19^a horo ĝis la 20h30, de la aprila, maja, junia, septembra monatoj, aŭ oni sendu ĝin poŝte. La verkoj devas atingi TEA-n ĝis maksimume la 16^a de oktobro 2015.

Art. 6 La ekspozicio de la konkursontaj verkoj okazos ĉe la TEA-sidejo, aŭ en aliaj ejoj ankorau difinendaj, en **novembro 2015**.

Art. 7 La premio-disdono okazos la **5^{an} de decembro 2015 je la 17^a horo**, ĉe la TEA-sidejo.

Art. 8 La nepremiitajn verkojn oni povos preni fine de la premia ceremonio aŭ dum la **vendredoj de januaro 2016**, ekde la 19^a horo ĝis la 20h30.

Se ĝis la fino de januaro 2016 oni ne kunprenis sian pentraĵon, tiu iĝos posedaĵo de TEA, kune kun ties reproduktorajto.

Art. 9 La juĝo de la Art-komisiono estas neapelaciebla kaj nekontestebla.

La Organiza Komitato, kvankam garantiante ordinaran gardadon de la transdonitaj verkoj, tamen ne respondecas pri ŝteloj kaj/aŭ damaĝoj eventuale okazontaj.

La partopreno en la konkurso antaŭvidas la senrezervajn konon kaj akcepton de la regularo, plus la plenigadon de la enskribiĝilo.

Art. 10 Konforme al la leĝo n. 196/03 pri gardado de personaj donitaĵoj, oni certigas, ke ĉiujn ricevitaĵajn datenojn oni prikonsideros per la pleja diskreteco kaj, en ĉiu momento, la aŭtoro rajtos peti ilian ĝisdatigon, kontrolon aŭ forviŝon.

Art. 11 La Asocio tenas por si la rajton, akcepti aŭ malakcepti la partoprenon de la prezentotaj konkursaĵoj.

Por ĉiu ajn informo kaj por ricevi la konkursajn regularon kaj partoprenilon, kontaktu la organizanton. Bonvolu, kiel eble plej, disvastigi ĉi konkurson!

Triesta Esperanto-Asocio
Tel: +39 331 4805706
esperantotrieste@yahoo.it
nored@tiscali.it, testudo.ts@gmail.com

Projekto "Koni Trieston"

Trafoliumante libron pri historiaj rememoroj

ŜULDO DE DINASTIO SAVOJO

La 19^{an} de junio 1867, en Queretaro (elp: Keretaro), Meksiko, estis pafmortigita Maksimiliano de Habsburgo, frato de Francisko Jozefo. Plej probable kaj onidire, li estis senkulpa viktimo de politikaj intrigoj. Fakte, la meksikaj grandbienulaj kaj klerikalaj konservemuloj, helpitaj de la franca imperiestro Napoleono la 3^a, klopodis subpremi en tiu amerika lando la ĵus starigitan respublikon far Benito Juarez. En tion ili sukcesis impliki arkidukon Maksimiliano, kiu estis nomumita Imperiestro de Meksiko la 10^{an} de aprilo 1864, dum solena ceremonio en la Kastelo Miramar.



Tiu princa rezidejo estis konstruigita sur prominenta roko de la triesta golfo, ĝuste en la sama haveneto kie la arkiduko, komandanto de la fregato 'Novara' trovis sekuran ŝirmejon dum abrupta ŝtormo. Li enamiĝis en Trieston, ĝian maron kaj la fascinan sovaĝan,

rokan naturon, tiel ke li decidis ĝuste tie ekloĝi kun sia edzino Carlotta el Belgio. Sed ni vidu, kio estis okazinta en Triesto, post la diskonigo de la funebra anonco. Grandaj konsterno kaj ĉagreno kaptis la tutan triestan loĝantaron, kiu multe lin amis. Do, tuj, kaj pli precize en julio samjare, formiĝis 'Komitato por starigo de monumento al Maksimiliano' kiu invitis la triestanojn monoferi favore al tiu realigo. Estis intenco loki la monumenton "en iu el la plej vastaj urbaj placoj kiel brila atesto de onia dankemo al la Princo tiom bonfara, kuraĝa kaj malfeliĉa". La komitato, prezidita de Barono Pasquale Revoltella, povis nombri inter siaj membroj la plej notindajn eminentulojn de la tiutempa urba vivo. Kaj tio ne okazis nur ene de la urbaj limoj, ĉar partoprenis en tiu monokolekta konkuro ankaŭ multaj eŭropaj suverenoj, inter kiuj la Italia reĝo Viktoro-Emanuelo la 2^a kiu, nedezirante senti sin malsupera al la aliaj, promesis transdoni la altan sumon de 200 oraj liroj. Fine de tiu jaro, la komitato zorge ĉion kalkulis kaj transnotis kredite en la bilancon de la nova jaro ĝuste tiun sumegon, ne ankoraŭ ricevitan sed certe ricevotan en pli-malplia baldaŭa tempo (*la promesitaĵo neniam eniris la komitatan kason!*).

Intertempe oni lanĉis konkurson en kiu partoprenis multaj artistoj, prezentintaj siajn provaĵojn, kies bildoj estas nun konservitaj en la muzea arkivo de Kastelo Miramare. Fine estis elektita la propono de la skulptisto Johann Schilling (1828-1910), kiu jam projektis monumentojn en pluraj germanaj urboj.

La 3^{an} de aprilo 1875, ĉeeste de imperiestro Francisko Jozefo, okazis la solena inaŭguro de la monumento situanta en la placo Jozefino (*nun placo Venecio*). Entute alta 8 metrojn kaj farita el bronzo, ĝi konsistas en eleganta kaj majesta statuo, prezentanta Maksimilianon en admirala vesto kaj staranta sur alta tamburo ornamita per reliefoj: la aŭstria flago, tiu de la milita kaj komerca marfloto, Triesto kaj Miramare. Sur la ok-latera bazo elstaras la personigoj tridimensiaj de la kvar kontinentoj, alternigitaj de malgrandaj rondformaj bareliefoj kun la simboloj de la scienco, poezio, artoj kaj industrio, kaj ankaŭ kelkaj surskriboj elstarigantaj la valoron kaj bonfaron de la arkiduko.

La monumento situis tie ĝis la fino de la unua mondmilito, kiam, post la alveno de Italio en Triesto, ĝi estis delokita kaj metita en deponojn. En 1961 oni transportis ĝin en la parkon Miramare, kie troviĝas la kastelo konstruigita de Maksimiliano, ĝis kiam, en 2008, post paso de 90 jaroj, oni decidis ĝin restarigi, en sia origina loko, placo Venecio. Arkiduko Maksimiliano de Habsburgo rigardas nun al la triesta golfo kaj al sia kastelo, kie li bedaŭrinde tro mallonge sukcesis vivi.

Kvizo pri TEA-Bulteno: 2 novaĵoj en ĝi

Unue, ĉu vi ne rimarkis, ke ĝi pli facile legeblas pro unu-punkta pligrandigo de la literoj? Due, apud la jaro troviĝas la sinsekva bultena numero, kalkulita ekde ĝia unuafoja apero en januaro 1998. Fakte, en tiu jaro ĉesis la eldono de *La Eta Gazeto*, pro la abrupta kaj tragika aŭtomobila akcidento kaŭzinta la morton de Aldo Viotto, ĝia ĉefredaktoro. Depost tiam la bulteno sufiĉe regule informadas la TEA-anojn kaj aliajn esperantistojn tra la mondo pri lokaj kaj internaciaj okazaĵoj: nature tute ne fareblas ia ajn komparo inter la du!!!

Dum sia naŭ-jara ekzisto *La Eta Gazeto* estis legita en Eŭropo kaj eĉ ekster Eŭropo. Kunlaboris kelkaj famaj kaj malpli famaj esperantistoj (sed ne pro tio malpli bravaj), kaj krome - grava atingo! - la direktoraro de la triesta tagĵurnalo *Il Piccolo* (La Eta) donis la permeson represi, esperantlingve, la humuraĵojn, skribajn kaj bildajn, aperintajn ĉiulunde kaj verkitaĵojn de du altnivelaj triestaj humoristoj, Carpinteri kaj Faraguna.

Nu, aliaj tempoj, aliaj historioj. Mi ne pensu pri l' pasinteco, ĉiam kuraĝe antaŭen: malgraŭ ĉio mi estas kontenta sukcesi ankoraŭ nun disponigi al geamikoj ian inform-**il**-on!

Laste trovitaj!

Tri gravaj pioniroj de la itala E-movado: Albert Gallois - Rosa Junck Clarence Bicknell

Ĉifoje la serĉado de esperantaj malnovaĵoj kaj unikaĵoj gajnis al mi aŭtentikan raraĵon: interesan bildkarton kun vidaĵo de la eta vilaĝo Riolutato, senditan la 7^{an} de marto 1904 al Francio de la grafo Albert Gallois. Sur la antaŭo klare legeblas lia subskribo.

Riolutato troviĝas en la centritala regiono Emilia-Romagna (elp. *Emilja-Romanja*), provinco Modena, kaj estas nuntempe loĝata de ĉ. 750 personoj. Tiu vilaĝo estas ligita al Esperanto ankaŭ ĉar tie estas du ZEO-j, Placo Esperanto kaj esperantlingva tabulo memore de la grafo.

Albert Gallois, franco, (1853, Bayeux - 1937) estis fakulo pri fervojaj retoj kaj de 1900 ĝis 1906 laborkiale vojaĝis i.a. al Tunizio, Kanado kaj Gvineo.



Li esperantistiĝis en 1902, edziĝis kun Luisa Rasponi, italino, kun kiu loĝis en Riolutato.

Tie li fariĝis la ĉefmotoro de la loka vivo: fondis plurajn socikulturajn asociojn kaj eĉ la unuan Esp-grupon en Italio. Plie li partoprenis en la

fondo de la Itala Societo por la Propagando de Esperanto, laŭ la modelo ekzistanta en Francio, kaj ankaŭ de la unua itala E-revuo "L'Esperantista" (Torino-1902). En 1903 li eĉ organizis internacian kongreson en la eta Riolutato, por kies loĝantaro ĝi estis vere eksterordinara evento.

A. Gallois tradukis en la italan du lernilojn de Th. Cart kaj, kune kun Rosa Junck, la Fundamenton de Esperanto.



Jen alia grava persono por la ekesto de la itala movado: **Rosa Junck** n. Bilek. Ŝi naskiĝis en Tábor, Bohemio, en 1850 kaj mortis en Bordighera (elp: *Bordigera*) en 1929. Lingvoinstruistino, ŝi translokiĝis al Italio en 1890 kaj eklernis Esperanton en 1897. En Bordighera ŝi agadis fervore kun

Clarence Bicknell, kiu mem tie loĝis, por propagandi Esperanton en Italio. Ŝi partoprenis en la 1^a UK en Boulogne-sur-Mer, dum kiu ŝi deklamis poemojn: L. L. Zamenhof ŝin laŭdis pro la modela prononco, kaj tial ŝi estis "kronita" reĝino de Esperanta deklamo.

En Bordighera, 1910, ŝi fondis, kun C. Bicknell, E-asocion, kies vicprezidanto ŝi iĝis.

Rosa Junck tradukis kelkajn verkojn de Edmondo de Amicis (elp: *Amicis*): "Floro de l' Pasinto" kaj "Kverko kaj Floro", kaj kunlaboris kun italaj revuoj. Ŝi partoprenis ankaŭ en la 'Floraj Ludoj' de Barcelono.

Sed la plej elstara persono sendube estis **Clarence Bicknell**. Naskita en Londono, 1842, li estis la 13^a filo de Elhanan Bicknell, balenolea negocisto kaj arta mecenato. Post la studoj en la Cambridge-Universitato li iĝis anglikana pastro. Ekde 1879 li vivis en Bordighera, apud kiu li mortis en 1918. Literaturisto, verkisto, vojaĝanto, botanikisto, arkeologo kaj ... Esperantisto: ĉio ĉi li estis kaj eĉ pli. Unu el liaj grandaj pasioj estis la studo de botaniko,




kun aparta amo al la floroj. Lin inspiris precipe la riĉeco de la flaŭro de Bordighera, sekve li komencis redakti albumon, en kiu li priskribis la florspeciojn

kaj mem pentris akvarele ties ĉi bildojn. En 1888 estis de li fondita Muzeo Bicknell, enhavanta liajn botanikajn kaj arkeologiajn kolektojn. Internacian renomon li gajnis, kiam li malkovris, kaj poste profunde studadis, la rokgravuraĵojn en la "Vallée des Merveilles" (Valo de la Mirindaĵoj), ĉio ĉi raportita en lia angla-lingva libro, "Gvidlibro pri surrokaj gravuraĵoj en la Maraj Alpoj" (eld. 1913).

Kio direndas pri Clarence Bicknell, esperantisto? Do, unue li studis Volapukon, poste ĝin forlasis por eklerni en

1897 Esperanton. Ankaŭ li ĉeestis la 1^{an} UK en Boulogne-sur-Mer, dum kiu li estis elektita Lingva Komitatano. Li komencis kaj traduki al kaj verki en Esperanto. Per poemoj plurfoje li partoprenis en la Floraj Ludoj, kun ofta sukcesa rezulto kaj kunlaboris kun pluraj esperantistaj revuoj (i.a. 'La Revuo', 'L' Esperanto' kaj 'La Brita Esperantisto').



'La Brita Esperantisto'

C. Bicknell krome multe kontribuis al la pliriĉigo de la unua E-kolekto de kristana himnaro "Ordo de Diservo" (1907), originale kaj traduke.

El liaj tradukaĵoj citindas "Ŝakludo" de la italo Giuseppe Giacosa. (elp. *Giuseppe Giacosa*)

Multe ankoraŭ oni povus rakonti pri li, sed mi preferas fini ĉi tiun mallongan priskribon per du liaj poeziaĵoj kiujn li skribis estante ĉirkaŭ 55/60jaraĝa.

Sonĝto

En ĝardeneto sola rozo floris:
Ĉe l' norda land' ne kreskis roz' pli bela;
Nenio en naturo pli odoris;
Ĝarden' nenia estis tiel hela.

Dancadis ĉiam apud ĝi fraŭlinoj;
Poetoj lertaj laŭdi ĝin ne ĉesis
Kaj sub la lumo pala la feinoj
Akvumis ĝin kaj l' ombron eĉ karesis.

Senzorga, ve! la ĝardenist' fariĝis!
Fraŭlinojn kaj feinojn li formetis;
Raŭpar', pro senpluveco, amasiĝis,

Fontoj: EdE; L'Esperanto in Italia - C. Minnaja; L'Esperanto-8/9-1986; Pionieri dell'Esperanto in Italia - E. Migliorini; Vikipedio; <http://www.clarencebicknell.com/> (en konstrua fazo)

Strioj de Salomono

Temas pri malnova enigmoludo, kie - se vi sukcesos ĝin solvi - legeblas aforismo, aŭ maksimumo aŭ proverbo. Jen la reguloj:

- 1) Uzante la listigitajn silabojn, enĉeligu en la unuan kaj trian linion de la strio la vortojn respondantajn al la subaj difinoj.
 - 2) Enmetu en ĉiun malplenan ĉelon de la dua linio unu el la du literoj estantaj en la supra aŭ malsupra ĉelo.
 - 3) En la centra strio vi povos legi Zamenhofan proverbon.
- Bonan amuziĝon!

1				2				3						
4							5					6		

BUL' DI DIA DRU E FA LA LAŬ MAS NA NE NO RO

- 1) Haro de ŝafo 2) Eluzi, korodi 3) Li donas ritmon 4) Trairebla per lumradioj 5) Akva vapor'
6) Konformeco, adaptiĝo.

Solvo en la venonta Bulteno

El nia mondo

SEULO GASTIGOS LA 102-AN UK

La ĉefurbo de Korea Respubliko, Seulo, gastigos la 102^{an} Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2017. La Estraro de UEA devis diskuti nekutime longe antaŭ ol fari la elekton inter Seulo kaj la kanada Montrealo, ĉar la invitoj de ambaŭ urboj estis zorge preparitaj kaj detale dokumentitaj. Ambaŭ lokoj prezentis tre bonajn kondiĉojn por sukcesa okazigo de la plej grava Esperanto-evento de la jaro.

Kaj sin sur floron kaj foliojn ĵetis.
Di' gardu ĉion! Helpon se ne portas
Ĉielo, la plej bela floro mortas!

Adiaŭ

Adiaŭ! la venteg' kruela
Blovadas dum la nokt' malhela,
Sed en la frumateno
La sun' brilante sur la teroj,
Juvelojn faros el neĝeroj;
Adiaŭ! sen ĉagreno.
Adiaŭ! el la pluvolarmoj
Naskiĝos la printempaj ĉarmoj,
Kaj, apud la rivero
Ni vidos milojn da floretoj,
Ni aŭdos kantojn de birdetoj;
Adiaŭ! kun espero.

Adiaŭ! raŭpoj kaj folioj
Ŝanĝiĝos; oraj papilioj
La rozajn karesados!
Rikolto la semadon kronos;
Premion pacienco donos;
Adiaŭ! ni amados.



VIGLO

Pri tio raportis jam pli frue la Ĝenerala Sekretario Martin Schäffer kaj la KKS Clay Magalhães, kiuj pasintjare faris esplorviziton al ambaŭ lokoj. La Universala Kongreso okazos en Seulo por la dua fojo. En 1994 ĝi gastigis la 79^{an} UK kun 1776 aliĝintoj. Korea Esperanto-Asocio estas unu el la plej viglaj landaj asocioj de UEA. Pri tio elstare atestas ankaŭ la fakto, ke la nombro de individuaj membroj en Korea Respubliko pli ol duobliĝis pasintjare: el 52 al 112.

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA - N. 575

La Ciklo de Akvo por Infanoj

La Usona Geologia Servo (angle *U.S. Geological Survey, USGS*) kaj la Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo de la Unuiĝintaj Nacioj (angle *Food and Agriculture Organization of the United Nations, FAO*) kreis skemon de la akvociklo por infanoj kaj bazlernejoj.

Inter la 12 uzataj lingvoj troviĝas ankaŭ Esperanto. La afiŝo estas elŝutebla kun alta kvalito 2300x1600 pikseloj ĉe:

<http://water.usgs.gov/edu/watercycle-kids-esperanto.html>

inf: Bert Schumann en [e-ins]; Fonto: *Novaĵservo "Ret-Info"* László Szilvási, *Lingvo-Studio*



Alarmo de Unuiĝintaj Nacioj: la Tero riskas perdi 40%-ojn da trinkebla akvo ene de 15 jaroj.

En la mondo la akvaj rezervoj estas rapide elĉerpiĝantaj: 20% da akvoriĉaj stratumoj estas troe ekspluatataj, tiom ke post 15 jaroj ekestos 40-procenta malpliigo de disponebla akvo. Por eviti tian katastrofon, urĝas esencaj intervenoj en la akva kondukado, ankaŭ konsidere de la kresko de la monda loĝantaro malsofigenda kaj nutrenda. Lanĉis tiun alarmon, okaze de la Monda Tago de Akvo, la UN-raporto marto 2015. La kalkuloj faritaj de UN evidentiĝas, ke la konsumoj, precipe agrikulturaj kaj energiaj, estas neelteneblaj kaj riskas preskaŭ senigi je akvo la planedon. Ĝis 2050 la bezono de akvo pliiĝos en la mondo ĝis 55 procentoj. Ekde tiam la agrikulturo, kiu jam ekspluatas 70%-jn da dolĉa akvo, devos meti je dispono de la homaro pliajn 60 procentojn por la nutraĵoj. Por la energia produktado necesos 16% de la tuta kvanto, kiu probable kreskos ĝis atingi de 20 procentoj ene de 20 jaroj. Flanke de manufaktura industrio

oni supozas, ke la antaŭvidita bezono, inter 2000 kaj 2050, pliiĝos ĝis atingi de 400 procentoj. Fronte de tiaj donitaĵoj klaras, ke oni devas revizii la tutan sistemon. UN sugestas, plibonigi la akvoprovizajn teknikojn, redukti la malŝaron kaj pliigi agrikulturan produktivecon. Pri energia produktado oni devos trovi pli efikajn malvarmigajn sistemojn por la instalaĵoj kaj pli uzadi la alternativajn fontojn kiel estas la venta, suna kaj geoterma energioj. Tia la situacio en la mondo, kia en Italio? Laŭ Istat (Itala Instituto pri Statistiko), la nacia elpreno de trinkebla akvo egalas al 9,5 kubmetraj miliardoj, el kiuj 84,8% estas subteraj akvoj. "La elkрана akvo ĝenerale estas bonkvalita," tion deklaras ENEA (nacia agentejo por la novaj teknologioj, energio kaj ekonomia daŭrigebla disvolviĝo) "sed restas pluraj solvendaj problemoj kiaj tro multnombra mastrumantaro, la alta kvanto de disperdiĝo en la distribuadaj retoj kaj la granda koncentriĝo de elementoj supozeble novaj, kiaj arseniko kaj fluoro".

Meditu, homoj, meditu!




WINDOWS KAJ ESPERANTO - helpu!

Mia entrepreno (Allsprachen-dienst Esperanto GmbH) submetis al Microsoft proponon por enkonduko de Esperanto-subteno por la programoj Windows kaj Office, kaj mi petas nun, ke multaj uzantoj subtenu mian proponon, tiel ke Microsoft konsideru la aferon serioze.

Subtenu la proponon ĉe: <http://office.uservice.com/forums/285186-general/suggestions/7186982-esperanto-support-for-orthography-and-grammar-for> Bonvolu favore voĉdoni por la propono, ŝatigi la proponon, kaj samtempe plivastigi mian supran mesaĝon al viaj esperantistaj konatoj. Amike Dietrich Michael Weidmann didi@esperanto.ch

Fonto: László Szilvási, Lingvo-Studio, www.eventoj.hu



- Mi luis dometon kaj nun, abrupte, oni eldormigis min!

Uno per tutti ... cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina senza costi per voi! Anche quest'anno i contribuenti possono destinare il 5 per mille dell'imposta stessa a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale. La nostra Associazione è fra gli enti che hanno diritto di ricevere questo contributo.

Come fare? È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2013 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente: **90012340320**.

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il **numero di codice fiscale della TEA**.

Maja Programo

1-a, vendr.	Sidejo fermita
5-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
8-a, vendr.	20h00 - "Kroata heredaĵo en UNESKO-listo" - prezento de Marija Belošević
12-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
15-a, vendr.	20h00 - Tradukado de triestaj poeziaĵoj al Esperanto
19-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
22-a, vendr.	20h00 - La malnova Triesto - filmo kaj fotoj de Pino
26-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
29-a, vendr.	20h00 - Projekto Grundtvig 2013-2015: rezultoj, impresoj, bildoj, memoraĵoj

Junia Programo

2-a, mardo	Sidejo fermita
5-a, vendr.	20h00 - Tradukado de triestaj poeziaĵoj al Esperanto
9-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
12-a, vendr.	20h00 - Trafoliumante PIV-on
16-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
19-a, vendr.	20h00 - Tradukado de triestaj poeziaĵoj al Esperanto
23-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
26-a, vendr.	20h00 - Somera festo!

Atentigo!

Ekde la 1^a de julio ĝis la fino de aŭgusto la sidejo estos fermita. La redaktanto de la TEA-Bulteno tamen ne ripozos kaj akurate (eble!) atingos vin via ŝatata informilo.

Bonan feriadon kaj ĝis la revido ĉe TEA-sidejo vendredon la 4^{an} de septembro!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

Kunventagoj: marde 17.30-20; vendrede 19-21

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Banka Konto: Unicredito—IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

Retoj: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

Kiam homo mortigas tigron, tio estas sporto; kiam tigro mortigas homon, tio estas kruelaĵo. Ne atendu la taŭgan momenton: kreu ĝin.

George Bernard Shaw, dramverkisto (1856-1950)
Homo kun nova ideo estas frenezulo ĝis kiam tiu ideo plensukcesas.

Mark Twain, verkisto, humuristo (1835 - 1910)